

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Por honori la okdekjariĝon de nia poeto Kálmán Kalocsay ni legis al vi antaŭ du semajnoj erojn el artikolo de William Auld aperinta en *Hungara Vivo*. Hodiaŭ ni unue legos al vi erojn el *Saluto al Kálmán Kalocsay okdekjara*, kiun verkis Juan Régulo-Pérez, la motoro de la eldonejo Stafeto, kiu eldonis tiom da verkoj de la iama ĉefredaktoro de *Literatura Mondo*.

Cl.- Juan Régulo-Pérez unue parolas pri la fidelo de Kalocsay :

A.- *Kio ĉiam min plej frapis ĉe Kalocsay, estas lia neŝanceblebla fidelo ; li ĉiam sciis trovi la apogilon, la necesan bazon por denove stimuli kaj fidigi post ĉiu malluma periodo.* (Fino de la citaĵo.)

Cl.- Tiu neŝanceblebla fidelo ĉiam sukcesis redoni kuraĝon al Juan Régulo-Pérez, eĉ kiam li troviĝis antaŭ ege malfacilaj situacioj, kaj vi povas imagi, ke ili abundas en la funkcio de esperanto-eldonisto. Ni ree donas la parolon al Juan Régulo-Pérez.

A.- *Se la iluzio, kiu malavare fruktigis mian esperantistan vivon per tre belaj momentoj, foje iom meandris, foje cedis el sia impeto, tamen ĝi ankoraŭ firme nestas ĉe mi, kaj unu el la fortikaj subtenpilieroj de tiu iluzio estas ja Kalocsay : li ĉiam sukcesis refirmigi mian kredon je la futuro de la afero. Aldone li sciis sanigi angorojn, forviŝi hezitojn : ne vane li ja ankaŭ estas kuracisto !* (Fino de la citaĵo.)

Cl.- Juan Régulo-Pérez vidas en Kalocsay *majstron de la vivarto*, aŭdu :

A.- *Forpasis preskaŭ kvardek jaroj. Dum tiu tempo Kalocsay, ĉu en ombro, ĉu en lumo, daŭre montris al ni, per sia vivekzemplo, kiel oni sin donas al elektita alvokiĝo. Sinsekve li naskis librojn, artikolojn, poemojn, ĉiam avangarde de la plej sana vivofido. Kiom facile certe estintus al li, meze de tiom da tumultoj kaj perfortoj, meze de tiom da transformiĝoj, surpaŝi vojon al rapida, spektakleca profitakiro. Sed Kalocsay, ankaŭ majstro de la vivarto, nur fosis sian sulkon !* (Fino de la citaĵo.)

Cl.- Kalocsay kiel ĉefredaktoro de *Literatura Mondo* iniciatis la kritikeman recenzon. Sed samtempe lin alfrontis la kutima recenzo, kiu malfacile eliris el la naiva kredo, ke la beletraj neologismoj estas grava malhelpo por la disvolviĝo de esperanto. Ankoraŭ nun floradas tiu kontraŭ-neologismemo, kiu unuflanke larĝe malfermas la pordon al miloj da teknikaj vortoj ofte tute ne ellaboritaj, sed kiu obstine rifuzas la esperanto-civitanecon al kelkaj radikoj jam bone vivantaj en nia poezio. Ni foje havos la okazon citadi el artikolo ĵus aperinta en nunjara esperanto-revuo, kiu bone respegulas tiun vidpunkton, kiu tiom malfavoris inteligentan studadon pri nia originala literaturo. Jen kion Juan Régulo-Pérez skribas pri Kalocsay kaj la recenzado :

A.- *Ni vidas en Kalocsay grandan bubon, kiu jen per neatendita sed pasiema malhumuriĝo, priokupita kaj grumblanta (je kioma fojo?), plenfide kaj celkonscie skribis kontraŭ tiu sensubstanca, griza, neevitebla mizero de nia recenzo, kiu naive kredas kaj volas kredigi, ke la beletraj neologismoj estas grava malhelpo por nia afero.*

Cl.- Kaj Juan Régulo-Pérez citas rimarkon de Kalocsay mem, kiu faras interesan paralelismen inter la defetismo de la adeptoj de vortara malriĉa esperanto kaj la defetismo de tiuj, kiuj ne povas kredi je esperanto kaj celadas al la naturalismo, tio estas, al la kreo de planlingvo, kiu plej multe simulu al latinida lingvo, kaj tiel donu la impreson, almenaŭ por eksterulo, esti ido de la latina lingvo. Oni nomas tiun tendencon, kiu naskis la lingvo-projektojn *Idiom Neutral* en 1893, *Latino sine Flexione* en 1910, *Occidental* en 1921 kaj *Interlingua* en 1951, la

naturalismo, aŭ kiel diras tiuj adeptoj : **naturalitate**. Post tiuj kelkaj klarigoj, jen la rimarko mem de Kalocsay, kiun li stampis sur la margeno de sia lasta libro, *La Tempesto* :

A.- *La zeloteco de lingva paŭperismo en Esperanto havas komunan originon kun la zeloteco de naturalitate en la okcidentismaj planlingvoj, nome defetismon (nefidon je venko). Ĉar por venkinta internacia (ĉies dua) lingvo estas de nenia signifo la pli granda vortostoko unupartite kaj la litera senĉapeleco aŭ unuavida komprenebleco aliparte.* (Fino de la citaĵo.)

Cl.- **Litera senĉapeleco kaj unuavida komprenebleco** estas la celado de la adeptoj de la naturalismo. Tio signifas, ke ili kritikis la ortografion de esperanto, ĉar ĝi uzas ĉapeligitajn literojn, kiuj ne ekzistas en la latina alfabeto. Forigante la ĉapelojn de la esperanta alfabeto ili samtempe devis ĉu rezigni krei lingvo-projektojn kun fonetika ortografio, ĉu limigi la konsonantaron, kio naskas fonetikan paŭperismon. Sed vi eble opinias, kial paroli pri tiuj problemoj, kiam oni honorigas Kálmán Kalocsay ? Ni parolas pri ili, ĉar, kiel Juan Régulo-Pérez tion montras, en sia artikolo, Kalocsay ne nur interesiĝis pri esperanto. Kiam li alfrontis foje preskaŭ nesolveblajn malfacilaĵojn tradukante poeziajn verkojn, tiam li sentis sin minacata de du tentminacoj : aŭ tro rapide memforĝi neologismon, aŭ perdi la kuraĝon, kio estintus pravigi la naturalisman tendencon, kiu antaŭdiris, ke esperanto ne estas lingvo kapabla naski literaturon. Kalocsay ĉiam serĉis solvojn, kiuj jam latente troviĝas en la lingvo mem. Pro tio li fakte forĝis multe malpli da neologismoj, ol la recenzistoj de la esperanto-bultenetoj kredis malkovri.

A.- Tiu sinteno, kiu karakterizas Kalocsay kaj liajn posteulojn, havis pozitivajn rezultojn. Ĝi fakte donis al esperanto ties nunan esprimovon, kiun malmultaj naciaj lingvoj povas konkurenci kaj verŝajne neniu alia naturalisma planlingva projekto povus atingi, eĉ sub la influo de talentuloj kiel Kalocsay.

Cl.- La artikolo de Juan Régulo-Pérez, kies kelkajn erojn ni citis, aperis en la revuo *Hungara Vivo*, 1971, numero 3-a.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni legos al vi belan poemon de Kalman Kalocsay, tio honore al lia ekdekjariĝo.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-